

Jarraportoj de Esperanto-USA

2019

**Preparita por la kongreso en Bostono,
Masaĉusetso, Usono
junio 14 – junio 17, 2019**

**Esperanto-USA
91-J Auburn St #1248
Portland MA 04103**

**tel: 510.653.0998
fakso: 866.200.1108**

**eusa@esperanto-usa.org
www.esperanto-usa.org**

Table of Contents

Raporto de la Prezidanto.....	3
Raporto de Charlotte Burton, estrarano.....	12
Raporto de Jordon Kalilich, estrarano.....	12
Raporto pri USEJ.....	13
Raporto pri la 48-a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) 2018....	13
Raporto pri la Senpaga Perpoŝta Lecionaro 2018.....	14
Raporto pri AAIE.....	15
Raporto pri Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo - Ron Glossop.....	15
Raporto pri Infanoj Ĉirkaŭ la Mondo - Charlotte Burton.....	17
Raporto pri la Kandidatiga Komitato.....	17
Raporto de la Direktoro.....	18
FINANCAJ DOKUMENTOJ.....	19

Raporto de la Prezidanto

Niaj Celoj

Nia Misia Deklaro

Esperanto USA estas senprofitcela organizaĵo, kiu kuraĝigas kaj fortigas la Esperanto-komunumon en Usono kaj ĝiaj teritorioj, per la faciligado de subteno kaj komunikado por lokaj grupoj kaj per la provizado de centralaj rimedoj por niaj membroj.

Our Mission Statement

Esperanto USA is a non-profit organization that encourages and strengthens the Esperanto community in the United States and its territories by facilitating support and communication for local groups and providing a centralized set of resources for our members.

Stato de la organizaĵo

Oni ofte mezuras membran organizaĵon per la kvanto da membroj. Ni iom pligrandiĝas, sed la kreskado ne stabilas. Kutime ni havas inter 500 kaj 600 membrojn. Nia direktoro sendas al la estraro monatan raporton. En januaro, 2019, Esperanto-USA havis 608 membrojn sed tio ne daŭris super 600. Ni scias, ke pli stabila pligrandiĝo okazos post niaj pliboniĝoj.

Jam dum kelkaj jaroj, ni ofertas membrecon por komencantoj kontraŭ malmulte da mono. Tio estas por tiuj, kiuj finis kurson en Esperanto. Oni rajtas membriĝi kontraŭ nur kvin dolaroj unu fojon, se tiu neniam antaŭe estis membro de ELNA aŭ Esperanto-USA. Vidu la detalojn pri la diversaj kategorioj en nia retbutiko. Dankon al Orlando, nia antaŭa prezidanto kaj tiu estraro por aprobi tiun helpon por la komencantoj. Tiu oferto daŭras.

Ni ne havas sufiĉajn membrojn por finance subteni la organizon nur kotize. Ni bezonas kaj pli da membroj kaj bonkorajn mondonacojn. Vidu niajn financajn raportojn por detaloj.

Lastatempe ni klopodas rekapti membrojn, kies membra periodo elĉerpiĝis. Legu la raporton de estrarano Jordon Kalilich, kiu kun Nikvo skribas leterojn al tiuj antaŭaj membroj.

La estraro klopodas doni atenton al la membroj. Tamen, se vi havas ideon pri kiel vi povos helpi nin, nepre bonvolu kontakti nin. Vidu la retpaĝon en nia retejo pri volontuli kaj kiel kontakti nin.

Lokaj Grupoj

Helpi al loĵaj grupoj (aŭ “kluboĵ” se vi preferas) estas unu el niaj ĉefaj celoj, kaj multe okupigas la diskuton de la estraro de Esperanto-USA. Pro tio, ni provizas helpon por niaj lokaj grupoj. Por multaj membroj de Esperanto-USA, la loka klubo estas la centro de la Esperanta vivo. Kun amikoj vi povas lerni, ludi, kanti, legi, ridi, foti, verki, traduki, ĝui, kaj diskuti viajn agadojn kaj revojn. Pro via loka grupo vi estas en amikaj rilatoj kun samideanoj de diversaj kulturoj, aĝoj, kredoj, opinioj, vivstiloj, ktp. Malgraŭ niaj malsamecoj, ni amikiĝas Esperante kaj esperante.

Listo de Lokaj Grupoj

Nia retejo ĉe <http://esperanto-usa.org/groups> havas liston de lokaj grupoj kaj personoj kiuj estas la kontakto por la grupoj. Se vi ne havas lokan grupon en via urbo aŭ vilaĝo kaj se vi volas havi lokan grupon, via regiona helpanto (kunordiganto) povos helpi diversmaniere. La kontaktinformo por la helpanto por ĉiu regiono estas en nia retejo en la “kontakto nin” retpaĝo.

Regionaj Kunordigantoj

Lokaj kluboj estas tiel grava, ke ni starigas sistemon de helpantoj. Ni havas unu regionan kunordiganton por ĉiu regiono el la dek en Usono kaj la teritorioj. La tasko de tiuj helpantoj estas informi, konsili, kaj provizi por la lokaj grupoj. Por la estraro ilia tasko estas pasigi informon dudirekte, al la grupoj kaj el la grupoj al la estraro kaj nia redakcio. Vidu ankaŭ informon pri gvidlibroj sub komunikado en ĉi tiu raporto.

Helpiloj por Lokaj Grupoj

Meetup.com estas retejo, kiuj anoncas eventojn en urboj. Tiu, kiuj ricevas la anoncojn akiros informon pri eventoj en diversaj lingvoj. Se vi anoncos vian klubkunvenojn per **meetups**, la lokanoj kiuj interesiĝas pri lingvoj legos pri via evento.

Duolingo Events estas ege fruktodona helpo. Se vi anoncos vian klubkunvenon per <https://events.duolingo.com>, Duolingo sendos anoncojn pri via klubo al ĉiuj kiuj studas Esperanto en Duolingo kaj loĝas cent mejlojn aŭ malpli for de vi. Tiu povas esti multaj studentoj de Esperanto, kiuj ne informiĝos pri via klubo per aliaj manieroj. Kelkaj kluboj jam gajnis kvin aŭ pli membrojn per Duolingo Events.

Amikiĝu estas apo por poŝtelefonoj. Ĝi montras aliajn Esperantistojn kiuj estas proksimaj al vi. Vi povas sendi mesaĝojn al ili per Amikiĝu. Informu ilin pri viaj klubkunvenoj.

Zoom, Skype, kaj **Google Hangouts** estas sistemoj por interretaj kunsidoj. Kelkaj kluboj uzas ilin por inkluzivi aliajn netieajn membrojn en klubkunveno.

ESF, la **Esperantic Studies Foundation** volas subteni lokajn grupojn. Via regiona helpanto havos informon pri financa helpo por via klubo. Komuniku kun via regional kunordiganto pri eblaj planoj.

Aliaj helpantoj por lokaj grupoj estas **Timothy Boronczyk**, kiu donas ĝeneralan helpon, kaj **Kyle Bailey**, kiu donas specifan helpon pri la iloj.

La Estraro

Aktive

Ni en la estraro estas multe pli aktivaj ol antaŭe. Ni estas en tre ofta komunikado. Ni interŝanĝas averaĝe 500 mesaĝojn semajne. Ni uzas retmesaĝojn, Slack, Trello, Zoom, kaj aliajn komunikilojn.

Ni kunsidas interrete ĉiumonate, ofte kvorume. Kelfoje tio ne sufiĉas, ke ni daŭrigas diskutojn per Slack aŭ per retmesaĝoj.

Videble

Via estraro klopodas videbligi la movadon al kaj al esperantujo kaj al malesperantujo per Google kaj per nia nova kanalo en Jutubo. Ni bezonas vian helpon informi la neesperantistan publikon pri Esperanto kaj tio, kio okazas en Esperanto-USA. Legu pri la postenoj en nia retejo. Klaku la menuon ĉe **Pri ni** (About us) kaj sube ĉe **Volontuli** (Volunteer).

Homoj kiuj serĉas informon pri Esperanto eble vidos niajn reklamon en la Google serĉilo. **Murray Merner**, nia kasisto, gvidis nin por restarigi nian konton en Google Ad Grants. Tiuj reklamoj estas senkostaj al ni, kiel senprofitcela organizaĵo. Murray kaj **Vilĉjo Harris** kunlaboris por aliĝi al tiu programo en Google, kaj sukcesis akiri aprobon por niaj senkostaj reklamoj.

Travideble

Via estraro klopodas raporti tion, kio okazas en la estraro kaj en movado. Ni metas la protokolojn de niaj kunsidoj en nian retejon, kaj raportas multe pli ofte en sociaj komunikiloj. Nia ĉefa raportilo estas nia oficiala bulteno, *Usona Esperantisto*.

Vi rajtas starigi demandojn, sugesti viajn ideojn kaj revojn, kaj fronti kin per viaj problemoj kaj defioj. Niaj retseminarioj kaj sesioj en reddit.com povas helpi vin. Legu plu sube en ĉi tiu raporto sub *Komunikado*.

Formale

Via estraro klopodas formaligi kaj ĝustigi niajn kunsidojn. Ni agas iom pli formale, por kongrui kun la akcepteblaj manieroj kunsidi en organizaĵo, en kiu la membroj havas pli fortan fidon. Ni sekvas la **Robert's Rules of Order Revised**. Niaj kunsidoj laŭas stilon, kiun sekvas aliaj ĉi tiaj organizaĵoj. Ni raportas pli ofte, publikigas niajn protokolojn per la retejo, kaj sekvas niajn multajn planojn pli zorge.

Malgraŭ ĉi tiuj celoj, ni estas tiel okupataj, ke ni bezonas vian helpon. Denove, vidi la paĝon en nia retejo (pri kiel volontuli) pri kiel vi povas helpi al Esperanto-USA.

Kase

Ni raportas la staton de nia kaso kaj la saldojn pli zorge, pli klare, kaj pli ofte. **Murray Merner**, nia kasisto ekde la Landa Kongreso en 2018, alvenis kun sperto pri lia partopreno en aliaj organizoj. Li faris multajn sugestojn pri kiel ŝanĝi la nomojn de kontoj aŭ fondusoj por klarigi la intenco de ĉiu konto. Li starigis demandojn por ekscii pri nia financa stato, kaj faris sugestojn, kiujn la estraro kaj direktoro de la CO realigis. La raportoj estas iom pli klara. Ni estas tre dankema pro la detala inspekto de Murray kaj lia sperto. Pro pli klaraj raportoj, la estraro havas pli bonan komprenon pri la spezoj kaj stato de ĉiu konto.

La estraro donas pli viglan atenton al la diversaj fondusoj, kaj klopodas uzi la rimedojn, kiujn ni havas, kiel eble plej efike. Homoj donas monon al la fondusoj por bonaj kialoj. Ni metos pli da informo pri la fondusoj en nian retejon. Ni raportas pri ili en niaj kutimaj financaj raportoj.

Kelkaj fondusoj provizas stipendiojn. Ni donas iom da informo pri la stato de la fondusoj, sed ne donas detalojn pri kiuj ricevas kiom da mono pro niaj zorgoj pri persona informo.

Orele - Alirebla

La estraro kaj aliaj gvidantoj klopodas aŭskulti vin, ĉu vi havas sugestojn, ideojn, plendojn, aŭ novaĵon. Membroj rajtas kontribui al nia organo *Usona Esperantisto*, sendi mesaĝojn, respondi per socia komunikilo, aŭ partopreni eventojn. Vi estas Esperanto-USA. Esperanto-USA estas vi. La estraro volas muldi vian organon en la formon, kiun la membroj volas kaj prirevas.

Pli formale, ni volas oferti manieron voĉdoni per diversaj manieroj. Antaŭe, la membroj voĉdonis nur per paperaj balotiloj. Ni nun starigas proponon al nia statuto por voĉdoni interrete. Dankon al **Vilĉjo Harris, la direktoro de nia Centra Oficejo**, por esplori ĉi tiun eblecon.

Rilate

Nia rilato kun aliaj organizaĵoj simbioze fruktodonas. Pro tiuj rilatoj, ni ĉiuj progresas pli efike en niaj celoj.

Chuck Mays, la ĉefa direktoro de Esperantic Studies Foundation (<https://www.esperantic.org/>) kunsidas kun mi interrete kelkfoje ĉiumonate por plani kaj helpi unu la alian. ESF agas tre efike en ties celoj. Dankon al ESF pro la financa helpo, pozitiva kuriĝigo, sugestoj, kaj sperta konsilado.

La nuna projekto, kiuj estas la plej evidenta rezulto de la kunlaboro inter E-USA kaj ESF, estas la kampanjo “**Esperanto-in-the-USA.**” Dankon al ESF pro tiu grandega helpo.

AAIE, la Amerika Asocio de Instruistoj de Esperanto, estas nia partnera organizo por tiuj, kiuj instruas Esperanton, aŭ havas intereson en la instruado aŭ lernigado de Esperanto. Ni devas daŭre honori al Doroteo Holland, Kent Jones, kaj aliaj gigantoj de la movado, kiuj laboris forte en la pasinteco por la instruado kaj por la ekzamenoj en Usono. Eble vi havas intereson en aliĝi al AAIE. Faru tion en nia retbutiko. Kiam vi estas membro de AAIE, vi ankaŭ aŭtomate estos membro de **ILEI, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**.

La rilato inter Esperanto-USA kaj USEJ tre fortas. Legu plu pri USEJ sube. Ankaŭ vi informiĝu pri TEJO ĉe <https://www.tejo.org/>.

Unu el la plej grava Esperanta organizoj estas **UEA, la Universala Esperanto-Asocio**. **Mark Fettes** estas la prezidanto de UEA. Legu pri UEA ĉe <https://uea.org>. Vi rajtas membriĝi al UEA en nia retbutiko. Kelkaj membroj de Esperanto-USA uzas nian retbutiko por membriĝi en E-USA, AAIE, kaj UEA samtempe. Esperanto-USA estas oficiala organiza membro de UEA. Homoj de Usono rajtas esti membroj. NI forte rekomendas al vi ekscii pri UEA kaj membriĝi. Internacia amikeco loĝas en la koro de Esperantujo.

Meritas vian tempon viziti la retejon de UEA kaj lernu pri la multaj eventoj de UEA kaj aliaj organizoj en Esperantujo. Membroj de UEA ricevas la ĉiumonatan bultenon **Esperanto**, kiu plenplenas je valora informo tra la mondo.

Venonte

Estraranoj kutime kaj laŭ la statuo servas tri jaran deĵoron. Ĉiun jaron ni havas kandidatojn por du el la ses membroj. Ĉi jare ni ankaŭ voĉdonas por sekretario. En 2020 ni voĉdonos por prezidanto, vic-prezidanto, kaj la du tiamaj estraranoj.

Pro la progreso, kiun Esperanto-USA nun ĝuas, kelkaj membroj volas kandidatiĝi por posteno en la estraro. Pro tio, ĉijare ni intervjuis la kandidatojn kaj publikis la filmon de tiuj intervjuoj en nia nova jutuba kanado. Vidu la kandidatojn ĉe <https://www.youtube.com/user/EsperantoUSA/videos> kaj spektu la filmon “EUSA Board Candidates 2019.”

Ĉijare ni anoncas la **nomumantan komitaton**, aŭ kandidatigan komitaton. La reguloj pri tiu komitato, kaj la informo pri kiel la voĉdonado funkcias, troviĝas en nia statuto, <http://esperanto-usa.org/eusa/bylaws>.

Kongresoj

La Daŭra Kongresa Komitato

Ĉijare nia kongreso situas en alia urbo de la pasinta jaro, kaj stariĝas pro la granda laboro de la **Loka Kongresa Komitato (LKK)**. Pro tio, ke multaj defioj povas refronti tiun komitaton, ni restarigas la Daŭran Kongresan Komitaton (DKK). En tiu komitato estos kvar aŭ kvin membroj. Ili estos reprezentanto de la pasintjara LKK, reprezentanto de la venontjara LKK, kaj du aŭ tre daŭra membroj, kiuj servas jaron post jaro. Tiu komitato kunsidos interrete kun la LKK por la koncerna jaro, kaj donos sperton al la planado. Tiu helpo elprenos pezon de la ŝultroj de la LKK-anoj.

Se vi havas sperton en provizi kongresojn aŭ konferencojn kaj volas helpi, volontuli por la DKK aŭ por la venonta LKK en via regiono.

Landa Kongreso en 2018 (LK2018)

Seatlanoj gastigis nian kongreson en 2018, kun cent partoprenantoj. Dankon al **Ben Speakmon**, **Nikvo Woods**, **Jordon Kalilich**, **Janjo Pacejo**, kaj **Chuck Mays** pro la bona kunlaboro.

Landa Kongreso en 2019 (LK2019)

Ĉijare, la kongreso en Bostono estas dulanda kongreso. Ĉiam estas bona rezulto gastigi internacian kongreson por ni kaj Kanado aŭ Meksiko. En 2019 ni bonvenigas niajn amikojn de Kanada al Bostono! Dankon al la LKK por la aranĝoj. La LKK por 2019 estas **Chris Pacejo**, **Janjo Pacejo**, **Andy Rosenbaum**, **Julie Schwartz**, **Marcus Griep**, kaj **Benson Smith**.

Landa Kongreso en 2020 (LK2020)

Nia landa kongreso en 2020 okazos dum la **Universala Kongreso en Montrealo!** Venu al la UK en Montrealo kaj vi estos tie ankaŭ por nia landa kongreso, kiu dume okazos. Niaj solenma malfermo, aferkunsidoj, estrara kunsido, kaj oficiala solemna fermo estos sesioj de la UK.

Por vi ĉi tiu aranĝo estas tre oportuna ŝanco sperti Universalan Kongreson. La lastatempaj UK-oj en nordamerko okazis en 1984 en Vankuvero, 1990 en Habano (Kubo), kaj 2010 en Habano.

Landa Kongreso en 2021 (LK2021)

Ni ankoraŭ ne decidis pri nia landa kongreso por 2021. Se via loka grupo volas esti LKK gastigi nin kun la helpo de la DKK, bonvolu informi la estraron. La estraro atendas vian proponon.

Universala Kongreso en 2020 (UK2020)

La UK en 2020 okazos oficiale per **KEA, la Kanada Esperanto-Asocio** (<https://esperanto.ca>). Tamen, Esperanto-USA kungastigos tiun **105an** Universalan Kongreson! Pro tio, ni formas la usonan parton de la LKK por Montrealo. La estraro de Esperanto-USA kaj nia direktoro de la CO jam kunsidis interrete kun la organizantoj de Kanado, sed ni faros multe pli en la venonta jaro.

Malgraŭ tio, ke ni ne loĝas en Montrealo, ni helpos antaŭ kaj post la UK per retkunsidoj. Ni helpos dum la UK ĉe la UK mem, ĉar multaj Usonanoj partoprenos en tiu UK, kiu tiel malofte okazas en najbara lando.

La gvidantoj en Kanado estas Normand Fleury (prezidanto de KEA), Garry Evans (kasisto), Martin Morris, Joel Amis, Ĵenja (Yevgeniya) Amis, kaj Nicolas Vieau. La ĉefa laboranto por la UK de UEA estas Clay Magalhães.

USEJ faras planojn helpi pri eventoj por junuloj, kaj via partopreno aŭ subteno por niaj junuloj helpos tion okazi sukcese. Por fari tion, bonvolu donaci monon al nia kampanjo “Esperanto in the USA.” Notu, ke via bonkora donaco helpos la movadon ne nur en Usono, sed ankaŭ specife la kongreson en Montrealo per nia USEJ-anoj.

Ni bezonas vian helpon ĉe la UK? La taskoj temas pri pluraj fakoj: akcepto, logistiko, informejo, komunikado / informado, teknikaj / retaj aferoj, en ekskursoj, ktp. Eĉ en tiu laborkampo, ni bezonas plani tiun helpon, por ke ni havu la helpon en ĉiu loko ĉe la UK.

Por lerni plu pri kongresoj, vizitu <https://uea.org/kongresoj/UK/2019> aŭ <https://uea.org/kongresoj/UK/2018>. Se vi neniam partoprenis an UK, la informo en tiuj retpaĝoj legindas.

Informo pri taskoj kaj progreso troviĝas en la bulteno Riverego, ĉe:

<http://www.esperanto.qc.ca/wp-content/uploads/2018/12/Riverego132-33.pdf> kaj

Informo haveblas ankaŭ per UEA:

<https://uea.org/aktuale/komunikoj/2019/UEA-kaj-UN-en-2019-2020-%E2%80%93-multflanka-kunlaboro>

Tiu artikolo temas pri la diversaj manieroj en kiu UEA kunlaboras kun diversaj fakoj de la Unuiĝintaj Nacioj. Preparu partopreni kun ni en la UK en Montrealo, kaj festu kun ni la 75an datrevenon de la UN kaj la kunlaboron inter ni kaj la UN.

Se vi volas ekscii plu pri agadoj de UEA, nepre aliĝu kun UEA. Post ol vi membriĝas kun UEA, vi rajtas esti delegito de Usono al UEA. Ne estas kroma kosto esti delegito por UEA.

Ni, la estraro, esperas ke vi volas partopreni en tiu UK en Montrealo, kaj ke vi volas helpi. Kontakto nin, kaj ni enkluzivos vin en la planado, ĉu en la junulara programo, en helpi ĉe la akceptejoj, en la artaj / distraj programoj, en ekskursoj, ktp.

Financa Stato – plua informo

Ŝanĝiĝoj en la Centra Oficejo

Nia financa kutimo dum kelkaj jaroj estis perdi proksimume \$30,000 jare. Tiu situacio ne povis daŭri. La estraro akceptis la ideon kaj proponon de **Vilĉjo Harris**, la direktoro de la **Centra Oficejo**. Tiu oficejo en Kalifornio kostis al ni multe da mono. Kion fari? La CO translokiĝis al la hejmo de Vilĉjo en Majno.

Tiu ŝanĝiĝo funkciis kun la plano de oferti librojn per Amazon. Nun, pro tiu decido, la homoj kiuj serĉas Esperantajn librojn interrete (ĉefe per Google aŭ Amazon), trovas librojn, kiuj antaŭe estis en la stoko de nia libroservo. Ni daŭre ofertas librojn rekte per nia libroservo. Por trovi la informon pri kiu libro haveblas per kiu servo, serĉu en nia libroservo en la retbutiko, kaj la informo por ĉiu titolo klarigas ĉu ĝi estus sendita per Amazon aŭ ne. Tio rezultas en nia ŝanco havi malmultekostan oficejon en la hejmo de Vilĉjo Harris, kaj ankaŭ aperigi la librojn per la serĉiloj, kiujn pli da homoj uzas.

Multan dankon al Vilĉjo Harris, kiu ŝultris la taskon movi la oficejon! La rezulto de tiu monŝparo komencas aperi en nia financaj raportoj, sed la jaro 2019 eble estos la unua jaro por montri ekvilibran stato, en kiu ni ne plu perdas monon. Tiu estas grandega evento por Esperanto-USA.

La Donaca Kampanjo “Esperanto in the USA”

“I Propose that we have a donation campaign in cooperation with the Matching Fund for ESF and that it be called Esperanto in the USA.” (- Phil Dorcas, aprobita unuanime per la estraro la 9a de februaro, 2019)

Ĉi tiu kampanjo venis el la kunlaboro kaj multaj diskutoj en la estraro de Esperanto-USA, en la estraro de ESF, kaj en la inter-organiza diskuto inter E-USA kaj ESF. Vi jam scias, ke ESF donas la monon en la sama kvanto kiun E-USA akiros per donacoj ĝis la sumo de \$15,000. Entute Esperanto-USA ricevos \$30,000 por specifaj projektoj. Ni volas sukcesi gajni tiun kvanton multe antaŭ la fino de 2019.

Tiun projekton ni planis multe. Ni lanĉis la kampanjon per retseminario (per Zoom). Ni filmregistris la eventon kaj provizis la eventon per nia nova jutuba kanalo. Antaŭ tio, ni planis la anoncon, verkis skripton, provludis la prezentaĵon, realigis la retseminaron, kaj aperigis la filmon per jutubon. Ni anoncas la aktualan staton de la kampanjo en nia retejo.

Ni dankas la homojn, kiuj bonkore donacas monon al la kampanjo. Dankon al **Hoss Firooznia**, nia reteja estro, kiu kunlaboris kaj faris helpajn retpaĝojn en nia retejo por subteni la kampanjon. Vidu la retejon ĉe: <http://esperanto-usa.org/eusa/support>. Ankaŭ vidu la raporton de Jordon Kalilich pri dankoj.

La Junuloj kaj la Nova USEJ

Unu el la ĉefa celoj de la kampanjo “Esperanto in the USA” estas subteni al USEJ, kaj specife la unuan trejnigan eventon.

La junaj samideanoj en Usono re-organizigas. Tiu organizo estas la Usona Esperantista Junularo. Gvidantoj de USEJ jam aktivis kaj eĉ starigis balotadon por formale krei estraron.

Unu ĉefa celo estas organizi eventon por trejni novajn gvidantojn kaj kunlabori por plani interesajn junularajn eventojn por la Universala Kongreso en Montrealo en la 2020. Ĉi tiu evento estas unu el al ĉefa celoj por la kampanjo “Esperanto in the USA.”

Se vi estas junulo en Usono, aliĝu al USEJ! Se vi ne estas junulo, sed volas helpi la junulojn, kontakti al USEJ aŭ al la estraro de E-USA kaj ni helpos vin. La plej oportuna maniero helpi estas donaci monon al la kampanjo “Esperanto en the USA.”

Kio estas “Junulo?” Mi surpriziĝis, kiam mi unue alvenis al Esperantujo pro tio, ke “junulo” estas pli aĝa ol mi opiniis antaŭe. Mi kutime opiniis ke junulo estas homo kiu aĝas malpli ol dek-ok aŭ dek-naŭ jarojn. Tamen, la difino de la vorto en Esperanto estas multe pli aĝa. La internacia organizo por junuloj estas TEJO - Tutmonda Esperantista Junulara Organizo deklaras ke la difino de junulo estas malpli ol 35 jaroj.

Komunikado

Nia bulteno

Hoss Firooznia daŭras kiel nia bona redaktoro de nia bulteno *Usona Esperantisto*. La numeroj nun kutime enhavas interesan artikolon el la arĥivo de ELNA. Kaj la tuta arĥivo de bultenoj de ELNA kaj E-USA haveblas al niaj membroj. Nia bulteno aperas ĉiujn du monatojn, kaj aperas fidele laŭ tiu plano. Dankon al Hoss.

Nia retejo

Hoss ankaŭ daŭre prizorgas nian dulingvan retejon. Ni memoras, ke post nia landa kongreso de 2017, nia retejo tute paneis. La paneado estis tiel, ke ni ne povis restarigi ĝin. Post nur unu semajno, Hoss provizis novan retejon kun bonan enhavon. Dankon al Hoss pro lia atento, helpo, kaj sperto.

Retseminarioj – (webinars)

Ni faris kelkajn retseminariojn per la ilo Zoom. Dankon al ESF por provizi tion al Esperanto-USA. Ni klopodas registri ilin por montri poste per nia jutuba kanalo. La plej grava retseminario estis tio por lanĉi nian kampanjon en kunlaboro kun ESF. Vidu tiun filmon ĉe

<https://www.youtube.com/user/EsperantoUSA/videos>, kaj vidu “Retseminario – Esperanto in the USA.”

Interretaj Kunsidoj

La estraro kunsidas interrete per la ilo Zoom. Lokaj grupoj, la rondo de regionaj helpantoj, kaj aliaj grupoj en Usono rajtas uzi Zoom, Skype, aŭ Google Hangouts. Elektu laŭ via prefero. Se vi bezonas pli ol 40 minutojn por kunsido, petu helpon de via regiona kunordiganto, de la estraro, aŭ de Kyle Bailey aŭ Tim Boronczyk.

Demandu al mi ion ajn – (AMA – Ask Me Anything)

Alia maniero kununiki kun niaj membroj estas per reddit.com en la AMA maniero. Ni jam faris tion kelfoje. Nia reddit.com komunikado troviĝas ĉe: <https://www.reddit.com/r/esperantousa>.

Aliaj Sociaj Komunikiloj

La estraro uzas ankaŭ Facebook (<https://www.facebook.com/esperantousa>), Slack, Trello, kaj aliajn ilojn. Tio ebligas pli bona kunlaboro kaj informado. Via loka grupo konsideru uzi la ilojn, kiuj plej efikas por vi.

Gvidlibroj

La estraro planas lanĉi projektojn por gvidlibroj por Lokaj Grupoj, la Estraro, kaj Landaj Kongresoj.

Tiun libron por lokaj grupoj la grupoj mem faros kun la helpo de la regionaj helpantoj. La estraro ne povos efike verki tion. La grupoj farus pli efike.

Estraranoj verkos helplibron por la estraro. Tio helpos nin mem en nia laboro, kaj helpos multe al novaj estraranoj, kiam ili ekdeĵoras.

La DKK kaj aliaj spertuloj pri kongresoj kunverkos gvidlibron por landaj kongresoj. Tio helpos ĉiun lokan kongresan komitaton fari la starigon de landa kongreso kune kun la helpo de la DKK.

Por ĉiu verko, ni povos uzi viajn ideojn kaj kunhelpon. Dankon. Kiel vi volas helpi nin?

Dankoj

Ni dankas multajn homojn por nia nuna pli bona stato. La nuna, pli aktiva estraro faras multajn paŝojn, sed multaj aliaj membroj helpas. Vidu la liston de regionaj helpantoj en nia retejo. Dankon al komitatoj, la estroj kaj komitatoj de fondusoj, la lokaj kongresaj komitatoj, nia direktoro de la centra oficejo, la redakcio, kaj multaj aliaj.

Via Helpo

Ni certe bezonas vian helpon. Se vi vidas niajn filmetojn en la jutuba kanalo, vi rimarkas kiel okupitaj ni estas. Pro tio, ni petas vin viziti nian liston por volontuloj en nia retejo. Legu pri la postenoj kaj taskoj. Infomu nin se vi volas helpi tiamaniere. Se vi havas aliajn ideojn pri via rolo en Esperanto-USA, informu nin aŭ vian regionan kunordiganton. Ni ĉiam pretas aŭskulti viajn ideojn kaj revojn.

Rimarku, ke la sistemo kun la regionaj kunordigantoj estas nova komunika infrastrukturo por ni. Ni volas fortigi nian dudirektan komunikadon kun lokaj grupoj. Ni volas helpi la lokajn grupojn, kaj provizi la ilojn, kiuj plej efikas por nia membraro. Por daŭri en ĉi tiu direkto, ni bezonas ke via loka grupo komuniki kun via regiona kunordiganto kaj informi tiun pri viaj kunsidoj, viaj planoj, kaj viaj bezonoj. Ni volas krei pli bonan stokon da rimedojn por lokaj grupoj. Viaj ideoj pri tio helpos nin. Dankon.

Amike, filipo

Phil Dorcas, prezidanto, Esperanto-USA

Junio, 2019

Raporto de Charlotte Burton, estrarano

Dum la lasta jaro, ni ĉe la estraro faris multon. Ni planis novan eventon, kiun ni esperas okazigi dum la venonta vintro, kun helpo de USEJ, kiu nun reviviĝas.

Ni fortege aktiviĝis per sociaj medioj la eĉ revivigis nian JuTuban kanalon. Nia kanalo publikigis 30 filmetojn dum nur du monatoj post ĝia reviviĝo, kaj la nombro da abonatoj pli ol duobligis. La kanalo publikigas filmetojn de la estraro kaj de la membroj. Bonvolu sendi al ni filmetojn pri viaj projektoj, pri viaj kluboj, pri viaj celoj.

Ni kunlaboras kun ESF pri monkampajno “Esperanto in the USA.” Mi partoprenas la Financan Subtenon Komitaton. Ni planis la kampajnon kun helpo de ESF. Ni parolis al la tuta estraro de Esperanto-USA, por esti certa ke ĉiuj ili donacas al la kampajno kaj plejmulte ankaŭ registris filmeton pri kial ili subtenas Esperanto en Usono. Ni laboras kun la bonega, helpegema Hoss por montri la progreson kaj la donacintojn sur nia retejo.

Mi mem plue laboras pri mia nova lernolibro, pri mia propra JuTuba kanalo, kaj nun ankaŭ pri AAIE, ICLM, USEJ, kaj diversaj aliaj projektoj. Mi estas fiera pri ĉio, kion ni faris dum la lasta jaro la antaŭĝojas ĉion, kion ni faros dum la venonta jaro.

Charlotte Burton

Estrarano

Raporto de Jordon Kalilich, estrarano

Unu el miaj ĉefaj intereso estas la deziroj de niaj membroj. Pasintjare mi ricevis poŝtkarton de alia el la organizaĵoj, kiujn mi subtenas. Sur ĝi estis manskribitaj danko kaj bondeziro, kaj tuŝis min la persona atento, kiu devis akompani la skribadon. Poste mi proponis al la estraro krei komitaton por reteni membrojn. Mi volis, ke la komitato manskribu leterojn al tiuj, kies

membreco ĉesis, petante kialojn de la ekŝigo. Analizinte la respondojn, la komitato povus rekomendi al la cetera estraro ŝanĝojn, kiuj pli kontentigos la membrojn. Krom mi, aliĝis al la komitato Nikvo Woods.

Kiel samurbanoj, Nikvo kaj mi facile povis kunlabori. Ni renkontiĝis dufoje por skribi al entute 49 personoj, kies membrecoj ĉesis dum trimonata periodo. Ricevinte la leterojn, almenaŭ 8 remembriĝis. Mi do taksas tre efikaj la 3-4 horojn, kiujn ni entute pasigis. Kelkaj el la ricevintoj sendis al ni retmesaĝojn kun klarigoj. Ili havis kialojn jen personajn, jen financajn, jen alispecajn. Pluraj ne povis toleri la koston de membreco, iafoje eĉ de la membreco por tiuj kun limigitaj enspezoj. Kelkaj dankis nin pro la memorigo kaj remembriĝis. Mi prezentos pli detale la rezultojn kun rekomendoj ĉe la LK.

Gravas al mi ankaŭ la kreado de belaj kaj modernaj propagandiloj. Mi rimarkis, ke malgraŭ la kreskanta influo de Interreto al la ĉiutaga vivo, ankaŭ la simpla gazonŝildo furoras. Oni uzas ilin, balotjare kaj ne, por disvidigi siajn valorojn. Mi kredas, ke estus utile krei gazonŝildojn kun devizoj, kiuj frape pensigas pri la lingva problemo aŭ pri la ekzisto de Esperanto. Mi skizis kelkajn versiojn de ŝildoj kaj esploris pri ŝildofirmaoj, celante proponi al la cetera estraro planon por farigi kaj distribui ilin. Tio ankoraŭ ne okazis, sed mi levos la temon ĝis la LK.

Lastatempe mi ekhavis rolon en Esperanto-USA krom tiu de estrarano. La cetera estraro elektis min estro de la fonduso Goldman, el kiu venas stipendioj por la LK. Mi kunlaboris kun Janjo Pacejo el la bostona LKK por certigi, ke la ĉi-jaraj stipendiotoj povos ion kontribui al organizado, informado aŭ la programo mem. Post la kongreso mi kontrolos, ĉu ĉiu stipendiito faris siajn promesitajn taskojn, kaj mi notos tiujn informojn por la estonteco. Tiel Esperanto-USA uzos saĝe la monon, kiun niaj membroj konfidis al ni.

Jordon Kalalich
estrarano

Raporto pri USEJ

USEJ (USona Esperantista Junularo) reviviĝas! USEJ estas la junula parto de Esperanto-USA. Ĉiu membro de Esperanto-USA kiu aĝas ne pli ol 35 jaraĝa, ankaŭ estas membro de USEJ. Dum iom da tempo USEJ tute ne estis aktiva, sed ne plu! Ekde la ĉi-jara Landa Kongreso, USEJ vivas denove, kun nova estraro. Se vi volus partopreni USEJ-n, kontaktu iu el la nova estraro, aŭ kontaktu la estraron de Esperanto-USA, kaj ili plusendos vian mesaĝon al USEJ. La nova USEJ havas grandan laboron antaŭ ni, kaj ni bonvenus vian helpon. Antaŭen kaj estonten!

Charlotte Burton

Raporto pri la 48-a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) 2018

La 49a Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto (NASK) okazis por la kvina fojo ĉe Unisversitato William Peace en Raleigh, Norda Karolino. La Kino-Teatro-Festivalo (KTF) okazis samloke dum la tuta tempo tiel ke partoprenantoj povis ĉeesti ambaŭ programojn. NASK

prezentis mallongan ok-tagan kursaron. Formalaj klasoj okazis ĉiutage (eĉ semajnfine) je tri niveloj: komencanta ĝis supera. La instrua teamo konsistis el Anna Löwenstein (el Italio) kaj Jose Antonio Vergara (Ĉilio) en du superaj kursoj, Katalin Kovats el Hungario kaj Nederlando en la meza kurso, kaj Thomas Alexander el Usono en la komencanta kurso. Multaj el la aktivoj estis bone raportitaj en la tag-ĵurnalo “La NASKa Fasko” redaktita de Brian Harmon, kiu ankaŭ gvidis la multajn ekskursojn. Oni povas legi la tag-ĵurnalojn ĉe: <http://nask.esperanto-usa.org>. La 86 partoprenantoj venis el 21 usonaj ŝtatoj, Kanado, Nederlando, Italio, Kenjo kaj Ĉilio, do la etoso restis vere internacia.

La Fonduso “Schulze Education Endowment” de la Esperantic Studies Foundation (ESF) finance subtenis la tutan programon, kaj efektive ĉiu partoprenanto ricevis iom da subvencia helpo. La “Schulze Education Endowment” estis kreita pere de la heredaĵo de Bill kaj Cathy Schulze por certigi la daŭron de la somera kursaro. 17 el la kursanoj ricevis aldonan subvencian helpon el la NASKE- Fonduso de Esperanto-USA kiu valoris \$6,680. La NASKE-Fonduso de Esperanto-USA estas longdaŭra fonduso kreita por helpi Esperanto-lernantojn studi ĉe NASK. Per la helpo de donaco de Esperantic Studies Foundation al Esperanto-USA por subteni lernantojn de Esperanto, 17 studantoj ricevis stipendian helpon en la sumo de \$9,160. WPU subtenis tri studentojn kontraŭ \$737 kaj sep Duolingo-studentoj per la helpo de ESF ricevis \$3,600. La Kanada Esperanto-Asocio provizis stipendion por unu kanadano.

